

Leterujo, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 527, 1973.11.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni malfermis nian leterujon por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj. Ni tiam menciis, ke alvenis poŝtkartoj kaj leteroj el 20 landoj, tio estas el Aŭstralio, Aŭstrio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Kubo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono.

A.- Laŭ la alfabeto vico de la landoj kaj de la skribintoj ni komencis babiladon kun nia aŭdantaro. Ni restis en Britio ĉe gesinjoroj B. Najbaro en Keighley. Tiuj skribemaj geaŭdantoj informiĝis, por scii, ĉu niaj radioprelegoj kaj tiuj de doktoro Arthur Baur foje aperos libroforme. Ĝis nun nenio estas antaŭvidita tiurilate. Sed revuoj komencis interesiĝi pri ili. Ekzemple nia prelegaro pri la ĝeneva filozofo *Ernest Naville, la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo* komencis aperi en la organo *Monata Cirkulero* de Kultura Centro Esperantista. Nia prelegaro pri *mondanismo* ekde decembro komencos aperi en *Sennaciulo* de SAT. De ambaŭ publikaĵoj ni ricevis kaj ricevos kelkajn numerojn por interesatoj de la radio. Do, se vi ŝatus ricevi tiujn artikol-seriojn, skribu al ni pere de la kanalo de la kurtunda servo de la Svisa Radio.

Cl.- En Ĉeĥoslovakio ni salutas la Esperanto-Rondeton, kiu kunsidas ĉe la Muzeo de Janko Kral en Liptovsky Mikulaš, sinjoron Jaroslav Karhan en Olomouc, Sinjoron František Pytloun en Podebrady kaj sinjoron Jiri Patera en Most, kiu sendis tre interesan leteron. El ĝi ni nun citas kelkajn erojn:

A.- Rilate al nia pasinta babilado kun la geaŭdantoj sinjoro Jiri Patera diras : *«Mi estis tre agrable surprizita per la granda nombro de landoj, de kiuj vi ricevas konfirmojn pri la aŭskultado. Certe tiuj ciferoj havas ankaŭ grandan propagandan valoron, ĉar se iu nekredemulo aŭdas, ke via radio dissendas en Esperanto kvarfoje semajne po dek minutojn, tiam li eble ne estos tre multe konvinkita pri la graveco de Esperanto, sed se ni al tio aldonas, ke la programojn aŭskultas esperantistoj el 28 landoj de kvin kontinentoj, tiam la tuta afero aspektas jam multe pli impona. Granda nombro de viaj aŭskultantoj estas en Francio, sed mi ĝojis, ke el mia lando skribis al vi almenaŭ tri, do mi ne estis sola. »*

Cl.- En Finnlando ni salutas sinjoron Jouko Lindstedt en Masala.

A.- Venas nun la vico de Francio, kie ni ja havas multajn geaŭdantojn, tio ne nur ĉar Francio estas proksima al Svislando, sed ankaŭ ĉar tie estas vigla esperantistaro kaj ankaŭ ĉar la elsendhoroj sufiĉe bone konvenas al tiu lando.

Cl.- Ni stalutas sinjoron Henri Masson en Courbevoie, sinjoron Albert Bessière en Rennes, kiu interalie skribis : *« Ofte mi aŭskultas la programon de via kurtunda stacio en franca, itala kaj esperanta lingvoj, kaj trovas grandan intereson kaj plezuron en tiu aŭskultado. Ĉar hodiaŭ mi aŭdis, ke mi povas ricevi dufoje en la jaro vian informilon pri viaj dissendaĵoj, mi skribas al vi por peti la sendadon de tiu informilo kaj tiamaniere ekkoni pli detale la horojn de viaj programoj. »*

A.- Aliaj interesatoj imitu lin. Ili sciigu sian nomon kaj donu sian adreson, kaj tio en treege legebla maniero. Tro ofte ni ricevas adresojn apenaŭ deĉifreblajn.

Cl.- Ni salutas sinjoron Maurice Bordessoule en Etaple, kiu skribas : *«Nune en Francujo, kiel en la Eŭropaj landoj, oni parolas pri **Eŭropo**, pri grupiĝo de la landoj formantaj blokon ekster la Eŭropaj orientaj landoj, sed neniam pri la lingvo kiu permesos al la popoloj de tiuj grupigataj landoj interkompreniĝi. Ĉu la Strasburga Parlamento parolis pri tiu grava afero ? Kiam la popoloj havos ilon de interbabilado ? Aliparte, kiam ni sekvas la debatojn, ĉu en Strasburgo, ĉu en Parizo, ni estas tute konfuzitaj vidi kun kiaj malfacilaĵoj tiuj debatoj disvolviĝas. Do, eĉ la kleruloj ne povas bone interkompreniĝi sen vera, facila, klara lingvo. »*

A.- Ni pensas, ke ĉiuj geaŭdantoj samopinias. Al ĉiuj el ni diskonigi tiujn faktojn ĉirkaŭ ni.

Cl.- Ni salutas sinjoron Alain Chalm en Le Havre, sinjoron Romain Chambaz en Etampes. Tiu urbo ĵus aldonis esperantan tradukon al sia turisma prospekto.

A.- Ni salutas sinjoron B. Chevery en Angers, kiu okupiĝas pri la esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon en Baugé.

Cl.- Ni salutas sinjoron Albert Cnudde en Meylan apud Grenobles, sinjoron Marius Dettapt en Thiers kaj la grupon Thiers-Esperanto, sinjorinon Erica Dietz en Strasbourg, kiu skribas : *« Vi ne povas kredi, kiom mi ŝatas aŭdi Esperanton en la radio kaj kia estas mia seniluziiĝo, kiam post longaj klopodoj estas ne eble kapti ĝin. »* (Fino de la citaĵo) Ĉiuj kaptantoj de la kurtondoj devus peti al radio-instalistoj la metadon de taŭga anteno, tiam la ricevado fariĝos malpli problema kaj la ĝojoj estos pli oftaj.

A.- Restas ankoraŭ geaŭdantoj por saluti en Francio. Hodiaŭ ni ankoraŭ direktas niajn voĉojn al sinjoro A. Frangeul en Angers, al sinjoro Lucien Giloteaux en Croix apud Roubaix. En tiu urbo Croix la 25-an de marto 1975 strato ricevis la nomon Doktoro Esperanto. Tiam estis organizita ekspozicio de infandeseĝnaĵoj kaj kunveno, kiu grupigis 80 esperantistojn el 5 landoj.

Cl.- Sinjorino E. Kohler en Besançon sendis la francan tradukon de prelego de ambasadoro Ralph Harry farita en la Esperanto-Societo en Nov-Jorko. Tiun tekston aperigis la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista. Fotokopioj estas haveblaj. Skribu al ni tra la kanalo de la kurtonda servo de la Svisa Radio.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Gis reaŭdo!